# NIA VOĈO

Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4°.28012 Madrid
(91) 530 87 98 persone lunde vespere
aliaj tagoj aŭtomata respondilo

Redaktas kaj eraras Lupe Sanz

JULIO-AŬGUSTO 1996


## ESPERANTO ĴURNALE

José Matos de Castro, membro de MEL, daŭrigas propagandon de esperanto. Nun la bulteno "Vecinos Zaidín" de Granado, (1996-05-31) publikigis tutpagan artikolon kun tri fotografaĵoj. Ĝi havas kuriozan erareton: ".. leer a F.Gª Lorca en Esperanto. De esta forma la gran obra Bodas de Sangre se escribiría *Sanga Nupto Kaj".* (sendube la ĵurnalistino ne konas nian lingvon kaj, kaj, kaj..)

La Murcia ĵurnalo "La Opinión" eldonis (96-06-04) artikolon de J. L. Pérez Óvilo laŭ titolo "El patológico síndrome de Babel" kie oferas diversajn versiojn pri lingva kaoso laŭ diversaj angulo: sikoanalista, marksista, kapitalista, jungiana kaj taoista.

La ĵurnalo ABC (96-06-07) en artikolo pri C.J. Cela kaj la datreveno de "Viaje a la Alcarria" parolas erare pri la traduko de tiu-ĉi libro al dekoj da lingvoj, inter ili nomas, erare, esperanton. Kiel ĉiuj esperantistoj scias, la verko de Cela kiu estis tradukita al la internacia lingvo estas "La familio de Pascual Duarte"

La revuo "Perfiles" eldonita de ONCE anoncis en la numero de junio la esperantajn kursojn de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Jesús Pérez sendis artikolon pri anarkiismo en kiu aperas biografion de diversaj hispanaj anarkiistoj, kelkaj el ili diris ke dum siaj restadoj en malliberulejo lernis esperanton.

## *HEF ANGULO*

Neniu povas diskuti la klopodojn kaj laborojn faritajn dum lastaj jaroj ĉe HEF-CO. La madridaj esperantistoj povas konstati persone ke almenaŭ du tagojn semajne, Manolo Parra kaj Marcos Cruz, faras administrajn laborojn en la oficejo. La helpo de Fernando del Moral kiel profesoro, Maritza Graziani kiel kontisto kaj la laboro de Ana Manero kiel "virino por ĉio", kaj, kompreneble, la motorciklo de Manolo kiu estas tre utila por porti pakaĵojn kaj rekomenditajn leterojn kiuj devas esti prenita iomete malproksime de CO. Ekde la lasta monato Juan Navareño helpas ankaŭ en arĥivo, ordigado kaj aranĝo de diversaj materialoj. AL ĈIÚĴ DANKON!! (Nia Voĉo)

HEF-CO sendis al ĉiuj E-grupoj diversajn informojn, kiujn ni resumas:
La "Instituto de Idiomas-Universidad de Santiago de Compostela" en kunlaboro kun HEF, dum Julio, organizas internaciajn kongresojn kun partopreno de du gravaj esperantistoj: Prof. Selten parolos pri "Ludoteorio kaj politiko" kaj Prof. Wells pri "Universitato kal Babelturo. Multilingvismo kaj Universitato". La unua prelego de Selten estos en Esperanto kun interpretado en la hispanan, farita de la HEF-Prezidanto. Wells prelegos ankaŭ en esperanto pri "Esperanto,, ĉu ŝerco aŭ serioza eblaĵo?" kun traduko al la angla kaj al la galega. La eventon financis Fondaĵo Pastor (Banco Pastor).
Laŭ la komunikado de HEF-prezidanto eble okazos la prezentado de la unua kajeron preparita por la pre-universitataj kursoj en esperanto (K+E), temas pri la verko "Sur la spuroj de Federico García Lorca" fare de Miguel Fernández, probable kun ĝi oni prezentos kasedon kiel komplementon de la libro. La Universitato de Santiago finacos 500 ekzemplerojn de la verko kaj la kasedon pagos la urbestraro (HEF anticipos 100.000 ESP).
La aliaj kajeroj, pretaj por eldoni, estas: "Enkonduko de la eŭropan juron" de R. Urueña, "Elementa kurso pri astronomio" verkita de Galadí kaj "Elementaj statistikaj kalkuloj en oficejo" de Alonso.

Dum la Kongreso de Murcia estos traktita la peto de Kataluna Esperanto Asocio por esti agnoskita kiel plia Landa Asocio de UEA. La estraro de HEF preparis tiurilate -12 paĝajn- dosieron por UEA.

## AŬSKULTU POLAN RADION

Pola Radio disaŭdigas en Esperanto du elsendojn tage (horo en la vintra mezeŭropa tempo, aldoni du horojn por Hispanio): 15.30 h 31,50 m; 41,18 m; 41,99 m; 50,00 m (=9525, 7285, 6000 kHz)
22.30 h 49,71 m; 49,22 m (=6035 kaj 6095 kHz)

## HISPANIO

**Murcio** La 30-an de majo ĉe Caja Murcia oni prezentis la libron "El viejo árbol (Vida de Ricardo Codorniú)" verkita de Enrique Morales. S-ro Codorniú estas konata kiel "arba apostolo" ĉar, antau 100 jaroj, li arbarumis Sierra Espuña, en Murcio. Antaŭe li estis unu el la patroj de la hispana esperanto-movado. En la akto partoprenis membroj de la Murcia Registraro, kaj aliaj enimentuloj kaj ekologistoj kiuj tutplenis la salonon. Parolis la aŭtoro, la nevo de Codorniu kaj J.L. Pérez Óvilo. La Ministrino pri "Media-Etoso" sendis apog-leteron kaj la firmao Codorniu donacis kelkajn botelojn da "kavo".
Ni jam menciis kelfoje en Nia Voĉo ke Ricardo Codorniú, kiel ekologisto, havas monumenton en la madrida parko "El Retiro", kaj kurioze okazas ke la monumento estas apuda al la de D-ro Cortezo, ankaŭ esperantistoj, pro tio oni diras ke Retiro havas "esperantan angulon".

## LICEO EKSKURSAS

La 6-an de Junio, gelernantoj de la kurso kiun gvidas Luis Ojer ekskursis al Puebla de Montalbán (Toledo), por viziti la fotovoltaika sun-elektro-kentralo. Unu el la gelernantoj, sun-teknikisto, klarigis diversajn detalojn pri tiu alternativa energi-fonto.

Ankaŭ la 22-an de junio okazis la programita ekskurso al Utande (Guadalajara). Tie esperantistoj povis vidi la faman "Loa de San Acacio" kaj tipajn folklorajn dancojn.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Dum Julio ni estos lunde vespere en nia sidejo. Ni fermos dum Aŭgusto
Ĉiu-lunde ni kunvenos, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°
Marde kaj jaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 80 79

**Kursoj**: Ĉiuj ferios ĝis Septembro/Oktobro

**Ekskursoj: 6-an julio (sabato) INTERNACIA FOLKLORA FESTIVALO.HITA (Guadalajara)**

# Koresponda kurso: AEU. Apdo 864. 29080 Málaga

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

55a Hispana Esperanto Kongreso. 12-17a julio. Murcio
81a Universala Kongreso de Esperanto. 21-28 julio Prago (Ĉekio)
4-a Internacia Kultura kaj Turisma Esperanto-semajno. 5-12a oktobro. Calella (Barcelona)

**VALENCIA ESPERANTO-GRUPO ORGANIZAS DU KARAVANOJN AL PRAGO,**

**⋆ 1.- aŭtobuso al Poprad kaj Praga, du semajnoj por 62.000 ESP**
**⋆ 2.- aviadilo + loĝado al Praga, 72.000 ESP**

**Petu informojn (96) 384 96 16**

# FELIĈAN SOMERON !!!!

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal